



Broŝuro de partoprenanto

Broŝuro de partoprenanto de RET-2017

Temo:

Idea, filozofia kaj religia fono de Esperanto

***La renkontiĝo estas dediĉita al 140-jariĝo
post naskiĝo de Ivan Ŝirjajev***

Loko: la bazejo de ripozo kaj turismo “Strangula korto”

(Чудной двор; Ярославская область, г. Пошехонье, ул.

Загородная 7)

Organiza komitato de RET-2017:

*Svetlana Smetanina, Mikaelo Ĉertilov,
monaĥo-pastro Taŭriono, Nikolao Gudskov;
pri la postarangita programo – Georgo Kontrov*

Kompilis Nikolao Gudskov

Redaktis Svetlana Smetanina kaj Mikaelo Ĉertilov

En la programo de RET okazos:

Raport-Reelekta Konferenco de Rusia Esperantista Unio

Lego-Tago omaĝe al 140-jara jubileo de I.Ŝirjaev

Prelegoj pri Ivan Ŝirjaev de Pastro-monaĥo Taŭriono, Timur Bikbulatov (ruslingve), Galina Burša (ruslingve), Sten Johansson (skriba mesaĝo) kaj aliaj kontribuoj

Somera Universitato kun prelegoj:

Zamenhof kiel reprezentanto de la “rusa kosmismo” (N. Gudskov), Filozofiaj aspektoj de lingvoplanado (A. Obrezkov), Lidia Zamenhof – vivo kaj agado; ŝiaj samideanoj (G. Basov), Sonato pri enterprenado (Spertoj de espa enterprenisto) (M. Bronŝtejn), La miraklofara ikono de la Tiĥvina Dipatrino (M. Bronŝtejn), Lingvo de fabeloj, aŭ samaj motivoj en fabeloj de diversaj landoj (A. Striganova), Avino Jaga (A. Striganova), Dronintaj urboj realaj kaj fabelaj (A. Striganova), Lingvoprotektado en Ĥanta-Mansa aŭtonoma distrikto – Ugrujo (V. Opletajev), Elektronikaj libroj en Esperanto (D. Ŝevĉenko), Esperanto en la socireta epoko (D. Ŝevĉenko)

Prezento

Eldonejo Impeto: novaj libroj kaj projektoj (dediĉe al 25-jariĝo)

Metiejoj

Lingva, tradukista, literatura

Diskutrondoj kaj rondotabloj

Instruista, movada

Koncertoj kaj aliaj artaj kaj amuzaj eroj

Koncertajn programojn prezentos Mikaelo Bronŝtejn, Mikaelo Povorin, Andreo Obrezkov ka., okazos Poezia horo (libera deklamado de ŝatataj aŭ plaĉaj poemoj en Esperanto, en amika neformala rondo), aŭtoraj horoj de Ludmila Novikova ka., Neptun-festo (se la vetero permesos), KGS

Ekskursoj kaj aliaj eksterbazejaj eventoj:

tra la urbo Poŝeĥonje kun vizito de muzeoj kaj vidindaĵoj; al Kukobojo, dum kiu okazos Liturgio memore al Ivan Ŝirjaev, poste vizito al muzeo de Avino Jaga; al Romanov-Borisoglebsk (Tutaev) tra Ribinsko; posttrenkontiĝa ekskurso al Jaroslavlo kaj Vjatskoje (2 tagoj) kaj Kostromao (1 tago)

Ivan Ŝirjajev – esperantisto, verkisto, pastro



Antaŭ 140 jaroj, la 11an (Gregorie: la 23an) de aprilo 1877 en la vilaĝo Vereteja (distrikto de Mologa en Jaroslavlj gubernio de Ruslando) naskiĝis Ivan Gennadjeviĉ Ŝirjajev (Ruse: Иван Геннадьевич Ширяев, 1877-1933). Lia patro Gennadij Ivanoviĉ Ŝirjajev (1845-1908) estis diakono, kaj lia patrino Aleksandra Ivanovna Ŝirjajeva (fraŭline: Uŝakova, 1850-1918) estis filino de la antaŭa diakono.

Iliaj gefiloj, malgraŭ la modesta socia deveno sukcesis ricevi bonan kleron kaj dignajn

laborojn. Fratoj: Fjodor (1868-1918), instruisto, direktoro de la lernejo en Vereteja, poste instruisto en komerca lernejo kaj en la universitato de Irkutsko en Siberio; Aleksandr (1872-1945), instruisto en Peterburgo-Leningrado, interalie, en la laborista fakultato de la Leningrada universitato, direktoro de komerca lernejo, ĵurnalisto kaj redaktoro; Nikolaj (1882-1933), arma kuracisto; fratinoj: Jekaterina (1870-90), instruistino mortinta dumakuŝe; Zinaida (1879-1942), instruistino, poste kantistino en opera koruso en Leningrado.

Ivan Ŝirjajev karieris multe pli modeste. En 1899 li finis la rusortodoksan seminarion en Jaroslavlj kaj dum kvin jaroj laboris kiel vilaĝa instruisto; en 1904 li iĝis pastro, unue en la vilaĝo Timoĥovo, poste en la vilaĝo Zinovjevo (ambaŭ en Jaroslavlj gubernio), fine li estis *dekano*. Lia edzino Marija Flegontovna Ŝirjajeva estis nomata *tipa vilaĝa popedzino*; ili havis tri filinojn: Anastasija (kontoristino en Leningrado), Jelena (servistino en Moskvo), Klavdija (flegistino en Vologda). I. G. Ŝirjajev mortis la 23an de oktobro 1933.

Ivan Ŝirjajev (pro la influo de la franca lingvo lia familionomo estas kutime misskribata *Ŝirjaev*) lernis Esperanton kiel 18-jara seminariano en 1895

(№3228 en la Zamenhofa *Adresaro*) kune kun sia frato Nikolaj (№3229). Li debutis literature per novelo *Memoras mi Viajn klarajn, bruligantajn okulojn* (Rememoro el senfrukta pasinta vivo) en *Lingvo Internacia*, 1898, №6-7. Poste li kunlaboris ankaŭ kun *L'Espérantiste*, *La Lumo*, *La Ondo de Esperanto*, *Kataluna Esperantisto*, *Heroldo de Esperanto*, *Literatura Mondo* kaj kun aliaj Esperanto-gazetoj. Li sukcese partoprenis en la Internaciaj Floraj Ludoj, en literaturaj konkursoj de la franca asocio SFPE, *La Ondo de Esperanto* k. a. En 1918-22 li redaktis kaj cirkuligis 43 numerojn de *La Rondiranto*.


Lia unua libro estis *Sep rakontoj*, eldonita en 1906 de Presa Esperantista Societo en Parizo (2a eld., 1908) kun la pseŭdonimo Ivan Malfeliĉulo; en 1907 unu el tiuj rakontoj aperis brajle. Sekvis tri originalaj noveloj *Tra la loko ensorĉita* (1913, 1992), *Forta impresio* (1914) kaj *Peko de Kain* (1932) kaj posteume eldonita kolekto *En la vagono kaj aliaj rakontoj* (1937) editorita de Teo Jung. Liaj noveloj estas presitaj en 33 *rakontoj*, *Trezoro* kaj *Nova Esperanta Krestomatio*. Sed lia ĉefverko, parte membiografia romano *Sen titolo* kun Esperanta fono, aperis nur en 1995, danke al Herbert Mayer, kiu eldonis kelkajn manuskriptojn de Ŝirjaev, konservitajn en la Internacia EsperantoMuzeo en Vieno. La romano estas sen-data, kaj kelkaj nomas ĝin la plej frua originala Esperanto-romano (la fina ĉapitro eble estis aldonita poste) kaj la plej interesa el la fruaj Esperanto-romanoj. Mayer eĉ nomis lin *La Esperanta Dostojevskij*, sed oni kutime pli laŭdas lian stilon ol la intrigon kaj psikologion, ekzemple: «Pleja surprizo ĉe Ŝirjaev: lia stilo. Lia lingvaĵo lirla kaj sentubera kaj natura – artisma –, diferenca disde la koda skemeco ĉe liaj samtempuloj. Lia talento por beletri per la magra vortprovizo de la fru-epoka Esperanto» (Miguel Fernández, *Esperanto*, 1993, №12).

Aperis ankaŭ kelkaj liaj tradukoj, ekzemple, *La festo de la renaskiĝo* de Doroŝeviĉ en la literatura aldono al *Lingvo Internacia* por 1906. Sed ne estas retrovitaj liaj tradukoj de *Fratoj Karamazov* de Dostojevskij, *Milito kaj paco* kaj *Anna Karenina* de Tolstoj, kaj Liturgio de S-ta Johano Orbuŝulo, pri kiuj oni skribis post lia morto. Lia plej grava projekto estis verkado de artikoloj pri Esperanto kaj esperantistoj. Ĝis majo 1930 li kompilis 2092 alfabeto ordigitajn artikol(et)ojn kun la titolo *Esperanto-Enciklopedio*, ili iĝis kerno de la *Enciklopedio de Esperanto*, kies unua volumo aperis kelkajn monatojn post lia morto (1934) kun la frontpaĝa indiko: «Iniciatinto-ĉefredaktoro I. Ŝirjaev». Post lia morto pastro Konstantin Markeloviĉ Kolobaŝkin trifoje celebris funebran liturgion en Esperanto je lia memoro en la preĝejo de la vilaĝo Lomigory (distrikto de Volovo en Lipecka regiono).

Aleksander Korĵenkov

Fonto: Novaĵretejo La Balta Ondo <http://sezonoj.ru/2017/04/shirjaev/>

Poŝeĥonjo, la urbo de stranguloj



La urbo Poŝeĥonjo troviĝas je 150 km nord-okcidente de Jaroslavlo, 60 km norde de Ribinsk kaj 100 km sude de Ĉerepovec en la Jaroslavla provinco. Fervojoj ĝin ne atingas, kaj ĝi atingeblas de la koncernaj urboj nur per aŭtovojoj (ne bonkvalitaj!) per aŭto aŭ aŭtobuso. Tial ĝi estas la plej aŭtentika reprezentanto de la profunda rusa provinco.

Iam la rivero Ŝeksnao nomiĝis Ŝeĥonjo, kaj la distrikto apud ĝi – Poŝeĥonjo. Sed neniu urbo en ĝi ekzistis, nur vilaĝoj. Centro de la distrikto ekde 1680 estis vilaĝo Pertomo, en kiu ĝuste antaŭ 300 jaroj, en 1717, estis konstruita katedralo de Sankta Triunuo. Nur en 1777, antaŭ 240 jaroj, la vilaĝo ricevis rangon de urbo kun la nomo de la distrikto. En ĝi ekzistis malgrandaj entreprenoj, tamen, la urbo neniam estis granda (ankaŭ nun en ĝi loĝas malpli ol 6000 homoj), kaj ĉefe estis centro de agrikultura distrikto. Tutlandan famon ĝi, tamen, havis – unue, pro produktado de ora staniolo por orumi statuojn, bildokadrojn, preĝejajn kupolojn ktp., kaj pro speciala loka speco de fromaĝo, tre populara en Rusio. Bedaŭrinde, la oran staniolon oni ĉesis produkti en Poŝeĥonjo 1979, kaj la fromaĝon – en 1990-aj...

Troviĝanta sur bordoj de kelkaj kunfluiĝantaj riveroj – en la urbo estas 7 pontoj trans ili, en Poŝeĥonjo oni ĉiam okupiĝis pri fiŝkaptado. Post plenigo de la Rininska “maro” (akvorezervejo) la akvo plialtiĝis kaj venis proksimen al la domoj, sed, feliĉe, difference de pluraj aliaj loĝlokoj de la regiono, la urbo ne estis dronigita plene.

Pro sia malgrandeco la urbo konservis ĝis nun la aŭtentikan aspekton de provinca urbeto de la 19-a jc., kio donas al ĝi siaspecan ĉarmon. Stratoj-radioj kunkuras al la centra placo, kie staras la katedralo kaj vendaj galerioj de 1830-aj jaroj; de la 19-a jarcento restis pluraj aliaj konstruaĵoj. Ekzistas interesa loka popola muzeo pri historio kaj naturo de la distrikto kaj muzeo “Domo de Toptigin”, kie okazas porinfanaj programoj pri ursoj. Oni povas supreniri la altan sonorilturon apud la

katedralo, de kie malfermiĝas belega pejzaĝo de la urbo, akvaj spacoj kaj ĉirkaŭaj arbaroj.

Proksime de Poŝehonjo estas ankoraŭ kelkaj interesaj kaj allogaj lokoj – ekzemple, Adriana Monaĥejo, fondita en 16-a jc. de s-ta Adriano, murdita de rabistoj. Lia korpo estis kaŝita en profunda arbaro apud fonto, kiu ekzistas ĝis nun. La promeno al la fonto, kiu estas konsiderata sankta loko, trinkado de la akvo kaj sinbano en specialaj bankavaĵoj povas esti interesa travivaĵo.




Poŝehonjanoj estas bonaj, agrablaj kaj gastamaj homoj. Tamen en la rusa kulturo ilia nomo elvokas imagon pri iuj strangaj, stultaj kaj konstante farantaj iujn misojn uloj. Pri tio kulpas ĉefe unu jaroslavl verkisto Vasilij Berezajskij (1762-1821), kiu en 1798 en la libro “Anekdotoj de antikvaj poŝehonjanoj” kolektis diversajn popolajn ŝercajn rakontojn kaj anekdotojn pri naivuloj kaj misuloj, kaj atribuis ilin al poŝehonjanoj (laŭ modelo de la germana verkisto Ch. M. Wieland, kiu verkis similan romanon pri loĝantoj de la antikva greka urbo Abdero, kiuj jam en antikveco rolis kiel simbolo de naivaj provincanoj). La profunde provinca situo de Poŝehonjo, ĝia vilaĝeca karaktero multe kontribuis al tiaspeca uzo de ilia nomo. Sed la poŝehonjanoj ne ofendiĝas, kaj volonte mem reproduktas la rakontojn, kie substrekas sian “strangecon”. Tial ankaŭ la ripoza bazejo, en kiu okazas RET, ricevis la nomon “Strangula korto”.

Kukobojo

Kukobojo estas granda vilaĝo (nuna loĝantaro estas ĉ. 1000 homoj) je 60 km de Poŝehonjo. Ĝi estas konata ekde 1526 jaro. La vilaĝo ĉiam estis riĉa, kaj el ĝi devenis negocisto Ivan Voronin, kiu en 1907-12 jaroj konstruis grandan belan preĝejon en pseŭdorusa stilo laŭ projekto de arkitekto Vasilij Kosjakov.

En 2004 Kukobojo estis proklamita naskiĝloko de Avino Jaga kaj estis konstruitaj specialaj objektoj (muzeo, parko, korto...) por allogi turistojn. Komence tio elvokis seriozajn protestojn flanke de la ortodoksa eklezio, kiu opiniis tion propaganda de malica pagana estaĵo, sed poste la miskomprenoj foriris – ja temas ne pri pagana religio, sed pri nacia folkloro, kaj nun la preĝejo pace kunvivas kun la muzeo.



Je ĉ. 10 km de Kukobojo iam estis vilaĝo Zinovjevo, kie loĝis kaj funkciis kiel pastro Ivan Ŝirjajev. La vilaĝo ne plu ekzistas, tie restis nur tombejo kaj ruinoj de la preĝejo. Tien kondukas nur grunda vojo, kaj la loĝloko de la fama esperantisto atingebblas nur per piede (aŭ per bona ĝipo) dum seka vetero.

Avino Jaga



Avino Jaga (ruse Baba-Jaga, ukraine – Baba-Jazja, pole – Babojeźdza, ĉeĥe – Ježibaba, serbe – baba Jega; Slovene – Jaga baba, slovake – Jezi baba, ktp., kun variaĵoj en ĉiu lingvo) – persono el komunslava folkloro, ludanta rolon de arbara gardistino kaj malica maljunulino-sorĉistino, kiu ofte nocas, sed ankaŭ povas foje helpi al heroo de fabelo, kiu ŝin ne timas.

Ŝin oni imagas kun unu osta piedo kaj longa griza malorda hararo, fluganta en pistujo helpe de pestilo kaj balailo; ŝi loĝas en kabano sur kokaj piedoj, kapablaj iom moviĝi... Kiel ĉiu rolulo de sorĉaj fabeloj, iam ŝi havis pli gravan rolon en slava pagana mitologio kiel gardistino de la limo inter la mondoj de vivantoj kaj mortintoj (jen tial unu ŝia piedo estas osta – per ĝi ŝi staras en la alia, “suba”, mondo de mortintoj).

Nu, tiun praan mitologion neniu nun memoras, sed fabelojn pri Avino Jaga-Jega-Jezi-Jeji konas ĉiu slava infano. Ĉirkaŭita de arbaroj Kukobojo decidis ekspluati tion, organizinte muzeon kaj parkon, dediĉitan al la populara fabela estaĵo. Tie oni rakontas pri ŝi kaj aliaj rusaj folkloraj arbaraj personoj, regalas per tradiciaj trinkaĵoj kaj kukoj, kaj ĝenerale bone amuzas kaj infanojn, kaj plenkreskulojn. Tial al tiu malproksima vilaĝo nun venas pluraj turistoj.



Romanov-Borisoglebsk (Tutaev)

Iam en la 13-a jc. Romano, la apanaĵa princo de Ugliĉ (sed, pli verŝajne, jarcenton poste la samnoma princo el Jaroslavlo) konstruis sur la maldekstra bordo de Volgo



je 34 km de Jaroslavlo fortikaĵon. Fine de la 15-a jc. ĝi eniris la Moskvan regnon, kaj en la 16-a jc. la caro Johano la 4-a (Terura) donacis la urbon al nogajaj tataroj, por tiel firmigi kun ili politikan aliancon. Dum pli ol jarcento Romanov estis iom stranga tatara enklavo en la pure rusa teritorio, ĝis kiam la caro Petro la 1-a transloĝigis de tie ĉiujn nebatitajn

tatarojn kaj detruis moskeojn... De tiu tempo, tamen, restis de la tataroj heredita bredado de romanova ŝafo – ŝafspeco karakteriza de tre malpeza kaj varma felo. La fortikaĵo ne plu gravis (nun oni apenaŭ povas vidi la restaĵojn de ties remparoj), sed la urbo fariĝis grava centro de komerco kaj metioj. Lokaj negocistoj estis riĉaj, kaj konstruis plurajn belajn preĝejojn.

Sur la dekstra bordo de Volga kontraŭ Romanov ekde 13-a jc. ekzistis vilaĝo Borisogleb, kiu en la 16-a fariĝis libera vilaĝo de fiŝkaptistoj. En la 17-a jc. kreskis ĝia negoca signifo, kaj tie aperis belega granda katedralo de Resurekto. Sed la rangon de urbo la libera vilaĝo ricevis nur en 1777.

En la jaro 1822 la urbojn sur la du volgaj bordoj oni administre unuigis je unu kun la nomo Romanov-Borisoglebsk. En la 19-a jc. ĝi fariĝis sufiĉe granda industria centro kun pluraj fabrikoj. Tamen en la urbo neniam ekzistis ponto, kaj ĝiaj du partoj unuiĝas aŭ per pramoj kaj boatoj, aŭ vintre, kiam Volga kovriĝas de glacio, sur kiu ne nur la homoj povas paŝi, sed eĉ la aŭtoj veturas.

En 1918 jaro ĝi estis renomita je Tutaev honore al iu proksime pereinta ruĝarmeano (fakte, neniel elstara persono). Nun okazas leĝa procezo pri restarigo de la historia nomo de la urbo.

En la sovetia periodo la urba industrio kreskis, kaj nun en la urbo loĝas ĉ. 40000 homoj, sed la industrio dum lastaj jaroj, bedaŭrinde, grave degeneris.

La famon al la urbo donas ĝia elstara beleco: du altaj bordoj de Volgo, kovritaj de malgrandaj dometoj, inter kiuj troviĝas pluraj altaj belaj malnovaj preĝejoj, faras neforgeseblan impreson. Du katedraloj sur la du bordoj – la Krucstariga de Romanov kaj, aparte, Resurekta en Borisoglebsk, estas elstaraj arkitekturaj monumentoj de la 17-a jc. Interne ili estas kovritaj de brilegaj freskoj kaj plenas de aliaj intereseĝaj objektoj. En la urbo funkcias kelkaj diverstemaj muzeoj.

Romanov-Borisoglebsk sen iuj troigoj estas unu el la plej vizitindaj urboj de la tuta Rusio.

Ribinsko

Ribinsko estas la dua laŭ grandeco urbo de la Jaroslavla provinco kun loĝantaro 200 000 (antaŭ 30 jaroj, antaŭ falo de la industrio en la urbo, ĝi atingis eĉ 250 000) ĉe influo al Volgo de la riveroj Ŝeksnao (dekstre) kaj Ĉerjomuĥo (maldekstre) je 80 km nord-okcidente de Jaroslavo. Ĝi estas konata kiel Ribnaja (Fiŝkaptaj) libera vilaĝo, apartenanta al moskvaj grandaj princoj kaj caroĵ ekde 1504, sed la urbo fariĝis nur en 1777. Ĝi estis tiam grava punkto sur la rivera vojo, kie pro malprofundiĝo de la rivero pli supre oni devis transmeti varojn de grandaj ŝipoj al malgrandaj (post apero de fervojo – al vagonoj). Antaŭ disvastiĝo de vaporŝipoj ĝi estis “ĉefurbo” de la volgaj ŝiptiristoj kaj ŝarĝistoj. La var- kaj moncirkulado de la haveno estis grandega malgraŭ tio, ke la urbo estis ne tro granda. Pro sia graveco en komerco en la urbo estis multe da riĉaj negocistoj, tie funkciis vigla panborso, kie okazadis komercado je greno, venigata ĉi tien de la tuta Volgo.

Ekde la unua mondmilito kaj, precipe, en la sovetia epoko en Ribinsko estis konstruitaj pluraj grandaj industriaj entreprenoj, inter kiuj elstaras aviadilmotora uzino, kelkaj ŝip- kaj maŝinkonstruaj uzinoj, kio puŝis kreskon de la urbo. Dum sovetia tempo la urbo kelkfoje ŝanĝis sian nomon – jen ĝi estis Sĉerbakov, jen Andropov – sed la origina fiŝa nomo ĉiam al ĝi revenadis.

La centra parto de Rybinsko konservis stratojn kun malnovaj domoj de la 18-a-19-a jc. Vidaĵo de la klasikisma katedralo (1838), nova panborso en pseŭdorusa stilo kaj



automobila ponto (1963) formas unuecan arkitekturan ensemblon, impone prezentantan la urbon. En la konstruaĵo de Nova borso troviĝas sufiĉe riĉa loka muzeo-rezervejo, en la urbo troviĝas ankaŭ aliaj muzeoj (i.a., domo-muzeo de A. Uĥtomskij kaj muzeo de la

fratoj Nobel, kies grandaj deponejoj de petrolo ka. naftoproduktaĵoj troviĝas apud Ribinsko kaj kreis bazon de ilia riĉeco). Ribinsko kaj ĉirkaŭaĵoj estas naskiĝloko de pluraj rusiaj famuloj kiel admiralo F. Uŝakov, grafo A. Musin-Puŝkin, dinastio Miĥalkov (el kiu deveins poeto Sergej, kinoreĝisoroj Nikita kaj Andrej), granda fiziologo A. Uĥtomskij, poeto L. Oŝanin ka. Al kelkaj el ili en la urbo estas starigitaj monumentoj.



Ribinska “maro”

En 1936 oni komencis konstrui la Ribinskan hidrocentalon kaj hidronodon. La projekto havis diversajn celojn – garantii normalan rivervojon de Volgo al la Balta maro kaj rivero Moskvo; kaj ankaŭ provizi la kreskantan industrian urbon per elektroenergio. En la konstruado, kiel ĉiam fine de la 1930-aj, partoprenis granda kvanto da prizonuloj de “Volgolaĝ”.

En tiu loko, kie Volgo estis plej malprofunda, estis konstruita 10 kilometra digo kaj duliniaj kluzoj. Aparta digo estis konstruita sur la rivero Ŝeksnao, pli supre ĝi kuniĝis kun Volgo je la unueca akvorezervejo. Averaĝa diferenco de la akvonivelejo supre kaj malsupre de la digo estas 15 metroj (maksimuma – 18 m).

La Ribinska akvorezervejo – “maro” – estas tre larĝa (ĝis 60 km) kaj malprofunda: la averaĝa profundeco estas nur 5,6 m (maksimuma – 25 m), ĝi dronigis grandajn teritoriojn en la valoj de la riveroj Mologo kaj Ŝeksnao, en kiuj troviĝis ĉirkaŭ 800 vilaĝoj kaj eĉ plena urbo Mologo – ties loĝantaroj estis transloĝigitaj precipe al Ribinsko. Entute devis ŝanĝi siajn loĝlokojn 130 000 homoj! Multaj fakuloj kaj simplaj homoj opinias la projekton pli malutila ol utila. La tuta areo de la lago estas 4580 km², la totala averaĝa akvovolumo estas 25,4 km³. Longeco de la bordoj estas 1724 km. En la momento de la konstruado ĝi estis la plej granda artefarita lago en la mondo, nun okupas la 6-an lokon.



La konstruado de la digo kaj kluzoj estis preskaŭ finita en 1941 kaj, kiam komenciĝis la 2-a mondmilito, la akvorezervejo ekpleniĝis per akvo kaj la centralo jam ekde novembro 1941 ekfunkciis. En 1942 elektro de la centralo per subtera linio venis al Moskvo – diference de la superteraj elektrolinioj ĝi neniam ĉesadis funkcii pro bombardadoj de germanaj aviadiloj. Finon de la konstruado de la tuta sistemo oni povas konsideri la jaron 1947, kiam la akvorezervejo atingis la projektan nivelon 102 m super la marnivelo. La plej gravaj havenoj de la “maro” estas la urboj Vesjegonsko ĉe enfluo de la rivero Mologo kaj Ĉerepoveco ĉe la influo de Ŝeksnao.

Nun ekzistas intencoj likvidi la akvorezervejojn kaj restarigi teritoriojn de la dronigitaj valoj, sed kiomgrade tio efektiveblas, ne tro klaras. Ekzistas ankaŭ sufiĉe realeca plano pri parta malgrandigo de la lago per malaltigo de ties nivelo je 4 metroj. Tio liberigus grandajn teritoriojn – ĝis duono de la dronigitaj, sed konservus la akvoreguligan funkcion de la hidrosistemo.

En Ribinsko estas speciala muzeo de Mologa regiono, dediĉita al la “Rusa Atlantido” – dronigitaj vilaĝoj kaj urboj.

Jaroslavlo

Jaroslavlo estas granda urbo (ĉ. 600 000 loĝantoj) je 280 km nordoriente de Moskvo.

Iam, antaŭ mil jaroj, ekzistis urbeto de la finna tribo *merja*, troviĝinta ĉe enfluo de la rivero Kotraslo al Volgo, kiu nomiĝis Ursa Angulo. Tie la paganoj adoris kiel totemon la urson, kaj tenis en speciala stalo la sanktan beston. La loko havis strategian signifon –



Kotraslo estis la natura vojo, kiu kunligis la antikvan centron de la regiono – Rostovon – kun la gravega rivero, kaj tiuj paganoj foj-foje rabis ŝip-karavanojn. La princo Jaroslavo (estonta granda kieva, t.e. tutrusia, princo, ricevinta la kromnomon “la Sagaca”), reginta tiam en Rostovo, venis al la urbeto de paganoj kaj ne nur venkis ilin mem, sed – plej grave! – mortigis ilian sanktan toteman ursinon... Kaj sur tiu loko li fondis la propran urbon-fortikaĵon, kiun nomis, kompreneble, honore al si mem. La evento okazis proksimume en 1010, kaj en 2010 oni solene festis miljariĝon de Jaroslavlo. La urso kun halebardo poste (paradokse!) fariĝis blazono de Jaroslavlo. Nu, kaj en la muzeo-rezervejo ekde 1988 loĝas enkaĝe la viva urba simbolo – ursino Manjo. Do, iom da pagana ursa kulto en Jaroslavlo transvivis mil jarojn...

Komence de la 13-a jc. en la urbo ekregis propra apanaĵa princo, aperis du monaĥejoj kaj la unuaj brikaĵoj preĝejoj, sed ĝi baldaŭ estis detruita rezulte de la mongola invado en 1238. Ankoraŭfoje Jaroslavlo estis detruita post ribelo de loĝantoj en 1257 jaro. La urbo tamen plu ekzistis kiel centro de malgranda princlando, ĝis kiam en 1463 ĝi definitive eniris la formiĝantan Moskvan regnon. En la 16-a jc. komenciĝas la komerca disfloro de la urbo, kiu troviĝis sur kruciĝo de la vojoj: de Moskvo norden, al la havenurbo Arĥangelsko, kun la Volga rivervojo de oriento al okcidento.

Dum la Granda Malordo (1605-1618) la urbo estis kelkfoje sieĝata; fine ĝi ludis gravan rolon en koncentriĝo de fortoj de la unua rusa milito en 1611 (fiaskinta), kaj de la dua milito sub gvido de Kosmo Minin kaj Demetrio Poĵarskij por liberigo de Moskvo de la polaj taĉmentoj. Tiam, en aprilo-junio 1612, dum 4 monatoj ĝi ludis rolon de la rusa ĉefurbo; tie estis emisiata arĝenta mono, necesa por bezonoj de la milito.

La 17-a jc. fariĝis periodo de la plej granda disfloro de la urbo. Tiam ĝi estis la dua post Moskvo laŭ la grandeco en la lando (nun – nur la 25-a!), triono el la centoj de la plej riĉaj negocistoj loĝis tie. Sufiĉas diri, ke dum tiu jarcento en la urbo estis konstruitaj 60 grandaj preĝejoj – cetere, poste oni preskaŭ ne plu konstruis la novajn – de tiu epoko jam sufiĉis! Jaroslavla arkitektoj kaj pentristoj ellaboris propran artan stilon, oni invitis ilin labori al multaj aliaj lokoj inkluzive la metropolon mem. Unu el karakterizaj trajtoj de la jaroslavla arkitekturo estas abunda uzado de multkoloraj majolikaj tabuletoj, frisoj kaj grandaj dekoraj detaloj – ekzemple, fenestromamo de la preĝejo de Johano la Orbuŝa altas je 8 metroj. Unu el la plej mirindaj preĝejoj de tiu epoko – de Johano Baptisto – nuntempe ornamas la 1000-rublan monbileton.

En la 18-a jc. graveco de Jaroslavlo malpliiĝis pro falo de komerco tra Arĥangelsko, sed jam tiam ekaperas la unuaj grandaj industriaj entreprenoj. Ĝi plu estis grava kultura centro: en la urbo en 1750 aktoro Fjodor Volkov fondis la unuan en Rusio profesian teatron. Post 2 jaroj la imperiestrino Elizabeta invitis lin daŭrigi la aferon en Peterburgo, sed Jaroslavlo ĉiam restis unu el la teatraĵ-ĉefurboj de la lando. Nun en la



teatro je la nomo de F. Volkov (la nuna sidejo estis konstruita en 1911) okazas, i.a., internaciaj teatraj festivaloj. Aperas la unuaj studejoj, inter ili en 1747 la Spirita Seminario – la pastra lernejo (en 1893-99 tie studis Ivan Ŝirjaev-Malfeliĉulo). En 1786 en Jaroslavlo aperas la unua en Rusio provinca revuo – “Ermita poŝehonjano”. En 1778 la urbo ricevas ĝeneralan planon, konforme al kiu plu rekonstruiĝas laŭ duoncirkle-radia skemo, centro de kiu fariĝas preĝejo de Profeto Elio, videbla en perspektivo de pluraj stratoj – tiu sistemo ekzistas ĝis nun. En 1788 jaro en biblioteko de la

likvidita Savinta monaĥejo estis trovita la sola manuskripto de la elstara rusa mezepoka poemo “Kanto pri la militiro de Igor”.

En la 19-a jc. la urbo plu beligiĝis per konstruado de domoj en la klasikisma stilo, aranĝo de urbaj ĝardenoj kaj promenejoj. La verda promenejo super Volgo, konstruita en 1820-aj jaroj, ĝis nun estas la plej bela el ĉiuj similaj promenejoj en Rusio. En Jaroslavlo plu kreskas industriaj entreprenoj, kion kontribuis konstruado en 1870 de fervojo, liginta la urbon kun Moskvo kaj aliaj gravaj lokoj. En 1900 diversajn partojn de la urbo ligis linioj de la elektra tramo. Aperas pluraj gimnazioj kaj supera lernejo (Jura Liceo de Demidov, fondita en 1803 kaj en 1868 egaligita al universitato)... Kulturan signifon de la urbo plifortigas la fakto, ke apud ĝi, en bieno Karabiĥo, loĝis kaj verkis la granda rusa poeto Nikolaj Nekrasov (1821-1878). Nun oni tie organizas ĉiujarajn poeziajn festojn.

En la 20-a jc. Jaroslavlo plu evoluis samtempe kiel industria kaj kultura centro. En sovetia epoko oni ekkonstruis diversajn fabrikojn kaj uzinojn, inter kiuj nepre menciindas lanĉita en 1932 la unua en la mondo fabriko de sintezita kaŭĉuko kaj surbaze de ĝi – la plej grava en USSR fabriko de pneŭmatikoj. En la Pneŭmatika fabriko en 1954-55 jaroj laboris juna jaroslavlanino Valentina Tereŝkova – la unua en la mondo virino, fluginta en 1963 en la kosman spacon.

La urbo estas grava centro de maŝinkonstrua industrio. Tutlandan signifon havas la Jaroslavla motora uzino, fondita ankoraŭ en 1916, sed plene disvolviĝinta en 1930-aj jaroj kiel unu el la plej gravaj en USSR produktejoj de grandaj kamionoj. En 1951-58 la uzino transiris al produktado de dizelaj motoroj. En la urbo funkcias 9 universitatoj kaj aliaj superaj lernejoj.

Malgraŭ granda industriigo de la urbo, la nova konstruado ne tro signife tuŝis ties malnovan parton (kvankam estis detruita la katedralo, restarigita en 2006-2010 dank’ al negocisto-mecenato Viktor Tyryŝkin); male, la arkitektoj ofte sukcesis konstrui ion novan tiel, ke ĝi harmoniu kun la ekzistanta aspekto de malnova Jaroslavlo – tial ĝia aspekto revenigas nin al la etoso de la 17-a–19-a jarcentoj. Ekzemple, la nova administra domo de 1960-aj jaroj tute organike eniris la ensemblon de la ĉefa urba placo. Tial Unesko en 2005 akceptis ĝin kiel objekton de la tutmonda heredaĵo.

En Jaroslavlo nepras promeni super la Volga bordo de la riverhaveno ĝis enfluo de Kotraslo – survoje, krom arkitekturaj monumentoj, troviĝas ekspozicioj de la Jaroslavla arta muzeo en la metropolita (17-a jc.) kaj guberniestra (19-a jc.) palacoj kaj viziti la Jaroslavlan muzeon-rezervejon en la konstruaĵoj de la eksa monaĥejo de Savinto (16-19-a jarcentoj) kun ties riĉaj artaj, historiaj, natursciencaj kaj literaturaj ekspozicioj. Nepre vizitindas la 17-jarcentaj preĝejoj de Profeto Elia kaj Johano Baptisto kun mondfamaj freskoj de Gurij Nikitiĥ kaj Dmitriĥ Plehanov. Pia ortodoksulo, certe, volus viziti la Tolgan monaĥejon kun ties abundaj sanktaĵoj (ankaŭ por laikoj ĝi vizitindas, ĉar estas tre bela), kaj ŝatantoj de la rusa literaturo – muzeon-bienon de N. Nekrasov Karabiĥo. Krom tio, en la urbo ekzistas dekoj de aliaj interesaj objektoj – i.a., tre bona moderna pejzaĝa zoologia ĝardeno.

Laŭ la artikolo en “La Ondo de Esperanto” 2017, Nro 2, mallongigita

Vilaĝo Vjatskoje

Foje iu diris, ke Vjatskoje, je 38 km nord-oriente de Jaroslavlo sur rivereto Uĥtomko, estas la plej bela vilaĝo de Rusio, kaj ĝi fariĝis la unua membro de la Asocio de la plej belaj vilaĝoj – do, ĝia elstara beleco estis agnoskita oficiale. Tio estis preteksto, ke oni komencu ĝin rekonstrui kiel turisman centron.



La vilaĝo, kies loĝantaro proksimas al 1000, aspektas kiel malgranda urbeto kun siaj du 18-jarcentaj preĝejoj (unu bela, la dua dume estas en ruinigita stato), ĉ. 100 ŝtonaj domoj (plejparto pli ol 100-jaraĝaj) kaj varia reliefo. Ĝi estas konata kiel metropolita posedaĵo ekde 1502, komence de la 17-a jc. ĝi apartenis al metropolito Filareto (Fjodor Nikitiĉ Romanov) – la patro de caro Mikaelo. En la 18-a jc. Vjatskoje estis komerca vilaĝo, kie okazis ĉiuĵaŭdaj bazaroj kaj ĉiujaraj foiroj. Kamparanoj okupiĝis pri kreskigado kaj peklado de kukumoj, linproduktado kaj bovbredado. Pluraj loĝantoj okupiĝis pri konstruado ne nur en la vilaĝo kaj apude, sed ankaŭ en Peterburgo kaj aliaj grandaj urboj, ĉefe famis la lokaj fornistoj kaj tegmentistoj. Krom kamparanoj, en la vilaĝo loĝis kelkaj negocistaj dinastioj.

Socia vivo ankaŭ estis ĉi tie aktiva, ĉiam kun opozicia nuanco. Krom ortodoksuloj, en Vjatskoje estis granda komunumo de “skismuloj”-malnovkredantoj; en 1870-aj jaroj ĉi tie estis unu el la ĉefaj centroj de revolucia propagando de la “popolemuloj”, kiu estis favore akceptata de la loĝantoj. Dum la civila milito, en 1919, la loĝantoj rezistis al la bolŝevistaj rekvizicioj de ĉevaloj kaj partoprenis en la “verda” movado... En la sovetia epoko la vilaĝo famis pro tio, ke en ĝi funkciis tre sukcesa ekonomie kolhozo “Ruĝa radio”, kaj en 1950-aj-70-aj jaroj – lernejo de vilaĝaj mekanikistoj, preparintaj fakulojn ankaŭ por aliaj regionoj.



Enkadre de transformo de la vilaĝo al turisma centro, oni ne nur rekonstruas la malnovajn domojn de negocistoj kaj riĉaj kamparanoj, transformante ilin je hoteloj kaj somerdomoj por jaroslavljaj riĉuloj, sed ankaŭ kreas diverstemajn muzeojn, rilatajn al la loka popola vivo. Nun da tiaj muzeoj estas deko, inter ili muzeo de rusa entreprenemo, de amhistorioj, de komercanta kampulo, de rusaj

amuzoj (sub la ĉielo), de la rusa banejo ka. Eble, la apartaj ekspozicioj ne ĉiam estas tre riĉaj, sed la tuta aro estas granda kaj varia.

Kostromao

Kostromao estas urbo kaj provinca centro kun loĝantaro ĉ. 275 000 je 65 km oriente de Jaroslavlo. Ĝi troviĝas sur du bordoj de Volgo, tamen ĝia historia parto troviĝas sur la maldekstra, ĉe enfluo de la rivero Kostromao. La urbo aperis en la 12-a jc., oficiala fonda jaro estas konsiderata 1152.



En la 13-a jc. la urbo fariĝis por kelka tempo centro de apanaĵo, ekde 1364 apartenas al moskvaj princoj. Grava ekonomia disvolviĝo de la urbo komenciĝis en la 17-a jc., kiam la urbo fariĝis por kelka tempo la tria en Rusio (post Moskvo kaj Jaroslavlo). Tiam ĝi famis pri siaj arkitektoj, kiujn oni invitis konstrui eĉ al Moskvo, kaj pentristoj, kiuj konkuris kun la majstroj el apuda

Jaroslavlo. En la 18-a jc. komenciĝas industria evoluo – aperas teksaj fabrikoj; linaj teksaĵoj estis bazo de la ekonomia disfloro de la urbo en la 19-a jc. kaj gravas ĝis nun (kvankam dum lastaj 30 jaroj produktado de linaj ŝtofoj draste falis). Pri ilia signifo sufiĉas diri, ke la bazo de riĉeco de la fratoj Tretjakov, kiuj okupiĝis pri kolektado de pentraĵoj (kaj Pavel Tretjakov evoluigis la rusan arton per fondo de la famega galerio) baziĝis sur iliaj teksaj fabrikoj en Kostromao. Ne malgravas ankaŭ la juvela industrio en Kostromao mem kaj en apuda vilaĝo Krasnoje.

Kostromao multon perdis en 1930-aj jaroj, kiam estis plene detruitaj ĉiuj konstruaĵoj sur teritorio de ĝia Kremlo, tamen multo restis kaj vidindas. Tio estas kelkaj brilaj ekstere kaj interne preĝejoj de la 17-a jc., katedralo de la Dia Bapto (16 jc.) kun la plej adorata ikono de St. Teodoro, klasikisma centro de la urbo kun grandegaj “vendovicoj”, famega fajrobrigada turo kaj radie irantaj de la centra placo stratoj – brila ekzemplo de la rusa klasikismo. En la centro troviĝas kelkaj muzeoj, i.a. la arta, kie, krom nemalbona kolekto de la tutrusie konataj artistoj, estas konstanta ekspozicio de la loka kamparana pentristo Jefim Ĉestnjakov. Ankaŭ bonegas muzeo de la naturo de la Kostromaa provinco.

La plej fama loko en Kostromao estas la Ipatjeva monaĥejo-fortikaĵo, konata ekde 1432 kaj historie ligita

kun du malamikaj inter si bojaraj, poste caraj, dinastioj: Godunov-oj kaj Romanov-oj. En ĝi estas belegaj konstruaĵoj de la 16-19 jc., elstaraj freskoj kaj ikonoj en la baziliko de Triunuo... Apud ĝi ekzistas muzeo-rezervejo de la ligna arkitekturo, kien oni alportis preĝejojn, muelejojn, banejojn kaj kamparanajn domojn el diversaj lokoj de la Kostromaa provinco.





Strangula korto – la loko de RET-2017

РОССИЙСКИЙ СОЮЗ ЭСПЕРАНТИСТОВ
Брошюра участника
Российских Дней Эсперанто,
посвящённых 140-летию со дня рождения Ивана Ширяева
Ярославская обл., г. Пошехонье,
02-09.08.2017